

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ
JARABONO: 6 SV. FRANKOJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONO

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Marian Solà

Un gran mistero per als Eminents ignorants de l'Esperanto

«L' Ere Nouvelle», diari parisenc dels que pesen en el periodisme de França, país de llengua nacional de prestigi internacional, publica, ja fa mesos, en fulletó, com a novel·la d'interès literari general a França, la obra «Çu li» escrita originalment en Esperanto pel Dr. Vallienne, i traduïda de l'Esperanto al francès per Ernest Archdeacon.

Els intel·lectuals de Barcelona poden constatar aquest fet, puix que en alguna biblioteca trobaran «L' Ere Nouvelle» de Paris, i també el trobaran en alguns quioscos de les Rambles.

Les idees preconcebudes i els prejudicis són falsos si són contradits pels fets.

La Federació Catalana Esperantista ofereix totes les dades necessàries als nostres intel·lectuals que vulguin sortir de dubtes relativament a un fet de tanta transcendència científica i literària com és la solució del problema de la llengua internacional en tots els ordres per mitjà de l'Esperanto.

Fajreroj

«Sud-Ameriko». Oficiala organo de la Urugvaja Esperanto-Societo. Aperas monate. Redakcio: Calle Rio Branco 1341; Montevideo (Urugvajo). Jaro I, N-ro 1, Januaro 1925. [4 p., 19,5 × 27 cm.] Abonprezo ne indikita. Ĝia Direktoro estas nia kataluna samideano Santiago Gomis, inĝeniero, kiu de antaŭ longe loĝas en Sudameriko, kaj ĉiam laboris por nia afero.

XVII Universala Kongreso de Esperanto. — Genève, 2. — 7 Aŭgusto 1925.

Administra informilo: Adreso: XVII. Kongreso de Esperanto, 12, Boulevard du Théâtre, Genève.

Kotizo: 25 Fr. sv. por persono: UEA-anoj 20 Fr. sv.; Junuloj (UEA-anoj) 15 Fr. sv.

Turista bileto, entenanta la kongreskotizon, biletojn por somera universitato, teatro, balo, ŝipekskurso, unusemajna loĝado kaj manĝado, kun ĉiuj trinkmono:

<i>Simpla:</i> 110 Fr. (ruĝa)	<i>Meza:</i> 140 Fr. (verda)	<i>Unuaranga:</i> 200 Fr. (flava)	<i>Luksa:</i> 300 Fr. (blanka)
----------------------------------	---------------------------------	--------------------------------------	-----------------------------------

Tiuj prezoj ne entenas la vojaĝkoston. — Repago okaze de neĉeesto malpli 20 fr. (kongreskotizo).

Ĉar la nombro de la turistaj biletoj estas limigita pro hotelaj kaj teatraj aranĝoj, oni mendu ilin tuj. La mendlisto estos firmata tre baldaŭ!

Vizo de pasportoj — El jenaj landoj la kongresanoj rajtas eniri Svislandon *sen vizo*, nur prezentante sian nacian pasporton: *Francojo, Liechtenstein, Belgujo, Danujo, Brita Imperio, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Hispanujo, ĉiuj ŝtatoj de Ameriko, Hinujo, Japanujo.*

Alilandaj kongresanoj devas prezenti sian pasporton al la svisa konsulejo, kie ili ricevos senpagan vizon, montrante sian kongreskarton. Kie ekzistas specialaj kondiĉoj pri vojaĝo eksterlanden, la L. K. K. faros necesajn klopodojn ĉe la koncerna registaro.

Pagmaniero: Laŭ interkonsento kun UEA ĝiaj poŝtĉekkontoj diverslandaj kun adreso de UEA povas esti uzataj.

Oomoto, la nova spirita movado. Ajabe, Japanlando [1924: Oomoto Fremdlanden-Propaganda Oficejo. [40 p., 12,5 × 18,5 cm.] 0,300 Sm.

Elektaj. -- Jen la rezultato de la voĉdonoj en la Lingvan Komitato kaj en la Akademio: Voĉdonintoj; 92. -- Lingva Komitato: S-ro Behrendt (89) voĉoj, — S-ro de Lajarte (88), — S-ro Tellini (86), — F-ino Zschepank (81), — S-ro Kasteer (78). Ĉiuj elektitaj. — Akademio. (6 postenoj). 1. S-ro Christaller (78) voĉoj, — 2. S-ro Warden (72), — 3. S-ro Nylén (67), — 4. Isbrucker (65), — 5. S-ro Bailey (47), — 6. Migliorini (47), — S-ro Behrendt (41), — S-ro Fisher (40), — S-ro Setälä (39), — S-ro Collinson (30), — S-ro Solà (14), — S-ro Butin (12). La ses unuaj, elektitaj.

XII^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

21-25 de majo 1925 - Palma de Mallorca

PROGRAMO

UNUA TAGO. — 22-MAJO 1925

Matene: Je la 7^a; Alveno de la gekongresanoj.

Je la 8^a; Prezentado ĉe la akceptejo (Esperantista Klubo Palma; Mesquida, 6) por la disdonado de la gvidlibro kaj Kongresinsigno.

Je la 9^a; Vizito al la Aŭtoritatuloj.

Je la 10³⁰; Solena Meso kun esperanta prediko ĉe Preĝejo Sankta Francisco.

Je la 12^a; Malferma kunsido de la Kongreso, ĉe «Associació per la Cultura de Mallorca» (str. Socors, 62).

Posttagmeze: Je la 15³⁰; Esperanta Ekspozicio ĉe Esperantista Klubo Palma (Mesquida, 6) kaj Ekzamenoj ĉe «Associació per la Cultura de Mallorca» (Socors, 62).

Je la 17³⁰; Labora kunsido de la Kongreso ĉe «Associació per la Cultura de Mallorca».

DUA TAGO. — 23-MAJO 1925

Matene: Je la 9^a; Ferma kunsido de la Kongreso ĉe «Associació per la Cultura de Mallorca» (Socors, 62).

Je la 11^a; Festo nomita «Floraj Ludoj» ĉe «Teatro Principal».

Posttagmeze: Je la 13³⁰; Oficiala Festeno ĉe «Grand Hotel».

Je la 16³⁰; Koncerto ĉe «Teatro Lírico».

Vespere: Je la 21^a; Kantaŭdajo de «Orfeoó Mallorquí» ĉe «Teatro Principal».

TRIA TAGO. — 24-MAJO 1925

Matene: Vizito al la urbo, al ĝiaj monumentoj, muzeoj, k. c.

Posttagmeze: Vizito al la ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

KVARA TAGO. — 25-MAJO 1925

Ekskurso al la famaj kavoj el Manacor.

Post la Kongreso oni povas efektiviĝi diversajn tre allogajn ekskursojn, nome: al Sóller; al Valldemossa, Miramar, Deyà kaj Sóller; al Torento de Pareis; al la Monaĥejo de Lluch; al Pollensa; al Andraitx, Estallenchs, Banyalbufar kaj Esporles. Ĉiu el tiuj ĉi ekskursoj oni povas efektiviĝi en unu tago.

*Kataluna Esperantista Majo 1925 № 99 Zinbun
Anschlag auf Seite 137*



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gufaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

XII^a Kongreso de Nia Federacio

22-25 Majo en Palma de Mallorca

SOLENA MOMENTO NI AMASE KONGRESU

Nia ĝojo estas granda. Nia spiro estas profunda. Ni atingis preskaŭ la pinton de la alta kaj abrupta monto de nia Kongreso en Palma. La Komitato de K. E. F. kaj nia kuraĝega prezidanto de la loka Komitato en la Baleara ĉefurbo devis foje eĉ malesperi pri la eblo pro malnia volo.

Sed la forto de nia idealo estas tiel kuraĝiga ĉe ni ke eĉ plej altdevena baro ne timigis nin, sed, kontraŭe nin incitis al pli grandaj klopodoj kaj oferoj.

En la mondo estas ĉiam kompenso. Kaj ju pli materia estas batado kontraŭ bono des pli sentebla kaj sentiga estas bono: Atmosfero, etero, animo fortigas responde al batoj de l'sorto kaj mokoĵoj de l'homoj. La bono, la vero, la belo, post krizoj kaj krimoj, militoj kaj faloj de homoj, -- instrumentaj etuloj de ili, -- iom post iom certe progresas, kaj ni iras malgraŭ ĉio kaj spite de ĉiuj al regnoj pli belaj, pli kaj pli bonaj kaj veraj.

En la mondo estas solenaj momentoj kiuj sentigas nin pli pure en la vojo de progreso kaj altiĝo. Esperanto-Kongreso, kun Floraj Ludoj, en belega lando: la XII^a Kongreso de nia Federacio, en Palma de Mallorca, estas plej certa okazo por ĝuo plej nobla.

Amikoj, samideanoj, ĝis la pene kaj sopire celita renkontiĝo en Palma post kelkaj tagoj.

Klariga Noto de komprenema Samideano

Kun vera ĝojo ni legis en la aprila numero de nia preskolego "La Suno Hispana" du "Notojn de Leganto", kiuj vidigas esperigajn horizontojn por vigligo kaj organizo de la hispanlingva samideanaro.

La unua el tiuj du "notoj" estas revoko ke "hispanaj esperantistoj el ĉiuj regionoj unuiĝu".

La duan noton ni volas, ni devas represi tutan:

"Jam mi haltas ĉe la vorto, kiun mi volonte estus evitinta. Vere, nia eminenta pioniro V. O. de Allende estas prava dirante, ke «kun relativa malfacileco la hispanaj esperantistoj iras la vojon de organizado». Organizo, grupiĝo, unuiĝo -- jen kio ŝajne ne facile resonas en la koroj de niaj samideanoj. Bilbao estis grava paŝo antaŭen en tiu direkto. «Sed restas ankoraŭ io farota». Allende diras, ke konfederacia regularo estos aprobata de la Registaro nur post aprobo de la unuopaj Federaciaj statutoj. Tio supozas unue la ekziston de Federacioj en ĉiuj regionoj, kio por mi ŝajnas peza postulo. Ĉu la plej simpla organiza linio ne estas grupo -- konfederacio? Unue ni ne diŝigu niajn malmultajn fortojn! Federacioj ne estas nepre necesaj, sed konfederacio jes. Tiuj nun devus ludi la rolon de «teritorioj» kiel ĉe UEA, ne esti memstaraj organizaĵoj kun granda estrara aparato, aparta kotizo kaj tre duba realvaloro. La grupoj estu la ĉeloj, el kiuj konsistas la tutlanda organizaĵo kiel en abelŝtato.

Ankaŭ pri la nomo mi ne konsentas. Mia sincera penso estas: Niaj katalun-lingvaj samcelanoj jam havas sian fortan, bone funkciantan federacion, kiu por ili samtempe estas nacia asocio kiel ekz. Brita E. asocio, Germana E. asocio k. t. p. La portugaloj samideanoj fondis laŭ ricevita informo antaŭ nelonge nacian federacion, kiu reprezentos la «portugalan asocion». Do, la nomo de nia organizaĵo aŭ societo aŭ unuiĝo tute logike devas esti: Hispana Esperanto-Asocio (HEA) Ĉiu el tiuj 3 asocioj publikigos sian organon. La katalunoj «Kataluna'n Esperantisto'n», la hispanoj LA SUNO'N HISPANA'N kaj verŝajne ankaŭ la portugaloj povos eldoni naci-lingvan-esperantan gazeton.

Ĉiuj tri asocioj, tiamaniere povos labori neĝenite kaj ne enmiksante sin en nacilingvaj aŭ regionaj aferoj, ĉiu por si kaj por Esperanto. Eble -- kaj mi esperas ke baldaŭ venos la tempo, kiam super tiuj tri *naciaj* asocioj fondiĝos el ili unu *sennacia*, tiu, kiun ni hodiaŭ nomas tute malprave «Iberia Konfederacio». Sed tiu de mi imagata havas malmulte da simileco kun la nuna.

El ĉio supre dirita sekvas, ke rilate al gazeto por Hispana Esperanto-Asocio ne povas ekzisti ia dubo. Ĝi estas propagandilo por *nacia* societo, ĝi havas la taskon varbi inter nacilingvanoj, kaj tial ĝia plej taŭga, plej trafa

formo estas tiu de LA SUNO HISPANA. Se poste ia: «Iberia Konfederacio» kreos alian gazeton, tiu kompreneble ne povos aperi kun trilingva teksto kaj Esperanto sed simple en nia internacia idioma. Ĝi tamen neniel tuŝas aŭ anstataŭas la nacian asocian organon.

Mi konscias, ke miaj pensoj, sugestoj kaj rimarkoj ne estas neeremaj. Malgraŭ tio mi komunikas ilin al vi, hispanaj esperantistoj, kaj mi esperas ke ili kunhelpu al la progresigo de nia sankta afero sude de la Pireneoj. Se tion mi nur iomete atingus, ne estus vane skribitaj la notoj de leganto.

JOBO"

Kiu inteligenta kompronema samideano konanta la hispanan organizan demandon de la Esperanto-Movado sin kaŝas sub la nomo "Jobo"? Ĉu eble nia kataluna Jacint Bregon? Ĉu la madridaj pioniroj Perogordo aŭ Inglada? Ĉu la valenciaj Piñó aŭ Caplliure? Ĉu la Saragosaj Gaston aŭ Maynar? Ĉu la kordovaj Azorin aŭ Serrano? Ĉu eble la militisto Mangada atente legis kaj bone komprenas la Zamenhofan principon de «Homaranismo» ke «la identigado de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento aŭ religio kaj la pretextado de iaj historiaj rajtoj, kiuj permesas al unu gento en la lando regi super la aliaj gentoj kaj forrifuzi al ili la plej elementan kaj naturan rajton je la patrujo, devas esti afero rigardata kiel restaĵo de la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo»? Ĉu estas fine komprenata ke en la Iberia duoninsulo estas almenaŭ kvar gentoj: la hispanlingva, la katalunlingva, la portugallingva, kaj la basklingva?

En la regnoj kie estas malsamaj lingvoj, Esperanto estas la sola neŭtrale-homa, la sola intergenta, internacia, komuna, paciga lingvo. — Ĉu? — En la regnoj, kie estas malsamaj gentoj, la principoj de homaranismo, kaj eĉ la svisa reĝimo de respekto kaj samrajteco, estas firma bazo de paco kaj amo, ĉar nur maljusteco akriĝas interhomajn diferencojn. — Kontraŭe, en justa reĝimo, la diferencoj interhomaj estas ĉarmo kaj klarigo de vivo: ĉu estus iala vivado de homoj ĉiuj korpe samformaj kaj spirite samgradaj?

Nuntempe se iuj homoj en la mondo vere povas paci kaj interfratiĝi estas ja la esperantistoj. Bonveninta semideano «Jobo», sub via prezido klariga kaj komprenema la katalunlingvaj esperantistoj sin sentas en regno de paco kaj amo ĉie en la Iberia duoninsulo. Kuraĝu prezentiĝi kaj preni kaj teni la bridojn de nia Movado intergrupa, interfederacia, internacia, aŭ konfederacia kaj estu certa pri nia konsento laŭ via noto.

Ĉi-tiu numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Pli ŝatas mi...

(Laŭ la maniero de la Kataluno Manuel de Cabanyes)

Printempo kantigas birdetojn sur branĉoj,
 antriloj aŭdiĝas en ĉiu novnesto.
 L'animo en festo pli ŝatas mi kanton
 de cia kisado.

Somero florigas ĉe herboj, floretojn
 kaj bluajn cejanojn sur vasta kamparo.
 Sen ia komparo pli ŝatas mi bluan
 de ciaj okuloj.

Aŭtuno flavigas de l'arboj, foliojn,
 per suno tre pala orumas tagfinon.
 Mi diras l'inklinon: pli ŝatas mi oron
 de ciaj blondharoj.

La Vintro malvarma veteron frostigas
 kaj neĝo flokege blankigas la teron.
 Aŭdetu l'preferon: pli ŝatas mi palon
 de cia blankhaŭto.

Kantetoj printempaj, floretoj someraj,
 aŭtuna orumo aŭ vintra aspekto
 — de l'viv' jen logplekto — ...Pli ŝatas mi ĉarmon
 de cia amado.

CHARLES BRUNET

(Menciita de la Xaj. Floraj Ludoj).

Lastahore ni informiĝis, ke la aŭtoro de la verko premiita per la Natu-
 ra Floro estas nia kara poeto S-ro Artur Domènech, kiu elektis F-inon Ca-
 talina Montaner Reĝino de la Festo. Nian saluton al la poeto kaj riveren-
 con al la Reĝino.

Por la «Kataluna Antologio»

La Eldona Komitato de la «Kataluna Antologio», por faciligi la baldan eldonon de tia grava verko, decidis krei kvanton da 25-pesetaj akcioj ĝis la atingo de la necesa kapitalo. Multaj akcioj estas jam akiritaj de fervoraj samideanoj kaj ni esperas ke la restantaj elĉerpiĝos dum la Kongreso en Palma de Mallorca.

La materialo por la «Kataluna Antologio» estas jam komplete preparita. Ĝi konsistas el: 1. «Antaŭparolo» pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. 2. Pli ol ducent tradukaĵoj en prozo aŭ en verso el proksimume 50 aŭtoroj. 3. Listo de la verkoj de ĉiu el ili. 4. Studo pri la ĉefaj katalunaj verkistoj: Verdaguer, Maragall, Guimerà, Costa i Llobera, Carner, Guasch, Victor Català, Bertrana, Ruyra, Casellas, kaj aliaj.

La «Kataluna Antologio» (la vera «antologio») ampleksos nur la modernajn poetojn kaj prozistojn, de post Verdaguer. Nia granda poeto malfermos la verkon per fragmentoj de sia fama poemo «La Atlantido». Sed, kiel «aldono», komence de la libro, estos presataj kelkaj belaj pecoj de la Mezepokaj aŭtoroj Bernat Metge, Auziàs March, Ramon Lull, Jordi de Sant Jordi, Joan Martorell, Roiç de Corella, la reĝo Jaume I. kaj aliaj. Eble aperos ankaŭ tri aŭ kvar tradukoj el la plej antikvaj katalunaj «trobadoroj».

Apartan intereson donos al la libro 14 versaj tradukoj de katalunaj popolkantoj, akompanataj de interesa studo pri la originoj kaj disvolviĝo de la popolkanto, kaj eble ankaŭ de la koncernaj 14 melodioj.

La «Kataluna Antologio» okupos 400 paĝojn kun la sama formato de «Kataluna Esperantisto» kaj pli bona papero; la libro estos tole bindita, kun orkoloraj literoj sur verda kovrilo. La prezo estos 12 pesetoj.

Se vi volas ĝui la zorge elektitajn kaj tradukitajn literaturaĵojn pretajn por la «Antologio», helpu fari tuj la eldonon per aĉetado de akcioj. Detalojn pri la financa flanko liveros la membroj de la «Eldona Komitato» S-roj Eduard Capdevila (Carders, 29), Artur Domènech (Cabanyes, 81) kaj Joan Gili Norta (Cornet i Mas, 43), ĉiuj en Barcelona. Se iu ne povas aĉeti akciojn, tiu sendu almenaŭ la sciigon ke li aĉetos unu aŭ du ekzemplerojn.

Ni esperas ke ĉiu kataluna samideano komprenos la gravecon de la projektata verko, same por la kataluna movado kiel por Esperanto, kaj ne rifuzos al ni sian malavaran helpon.

JAUME GRAU CASAS

Grava aktualasc iigo. — Samtempe kun la aliaj ĉirkaŭ 15 nacilingvaj tradukoj de la plej nova verko de Francesco Nitti (iama ministrara prezidanto itala) aperos sub la titolo «LA PACO» (aro da paroladoj faritaj en Skandinavio kaj en Svislando) speciala Esperanto-eldono. La tradukaj laboroj nuntempe estas farataj de du lertaj esperantistoj. La diplomato kaj pacifisto mem instigis la eldonejon de la Frankfurter Societäts-Druckerei, Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M., fari specialan Esperanto-tradukon por konatigi kiel eble plej rapide siajn ideojn al la tuta mondo.

Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

LA URBESTIO DE ZALAMEA. — Dramo en tri aktoj de Calderón de la Barca, tradukita el hispana lingvo de Enrique Legrand. Eldono de la tradukinto, Montevideo, 1925, 136 paĝoj, $18 \times 11\frac{1}{2}$. Prezo ne montrita.

El la verko ni ĉerpas la jenan noton de la tradukinto: «La Urbestro de Zalamea estas verkita en la jaro 1651, kaj la saman jaron Calderón fariĝis ekleziulo. Aparte de sia merito literatura, tiu ĉi dramo estis severa kaj kuraĝa leciono kontraŭ tro oftaj ofendaĵoj de la tiutempa soldataro. Perfortaĵoj de oficiroj kontraŭ honestaj virinoj okazis ofte. El unu el tiuj veraj dramoj eltiris la granda poeto sian teatraĵon. Li maltemis, eĉ sub regado de reĝo kiel Filipo II., montri sur publika scenejo, kiel simpla kamparano punas per malnobla mortigo tian perforton, kvankam la krimulo estas kapitano de la reĝa armeo».

La konata klasika verko trovis ne tre lertan tradukanton. La vigleco de la originalo, tamen, kelkafoje trafe reflektiĝas tra la traduko. En diversaj lokoj la tradukinto uzas «kvankam» anstataŭ «se eĉ», imperativon anstataŭ indikativo, prepoziciojn *de* kaj *krom* antaŭ infinitivo. Aliaj makuletoj estas forigindaj okaze de nova eldono. — *Saljo*.

OFICIALA KLASIKA LIBRO DE ESPERANTO. — Kolekto de la Akademio. Franca, angla kaj germana partoj. Esperantista Centra Librejo, 1924, 120 paĝoj, $15\frac{1}{2} \times 10$. Prezo, 3 fr. frk.

Tiu ĉi broŝuro, laŭ noto de la kompilinto Sro. E. Grosjean-Maupin, enhavas, krom la dek-ses reguloj de la gramatiko, ĉiujn nunajn oficialajn radikojn de Esperanto.

1-e. La unua parto enhavas la francan, anglan kaj germanan zorge korektitajn kaj kompletigitajn tradukojn de tiuj oficialaj radikoj, esceptante la radikojn, kiuj estas sufiĉe internaciaj por ne bezoni tradukon.

2-e. La dua parto enhavas la internaciajn radikojn, kiuj, eĉ estante netradukitaj, estas ĝenerale kompreneblaj por eŭroplingvanoj.


3-e. La tria parto enhavas la esperantlingvan difinon de la netradukitaj radikoj, kiuj ne troviĝas en la bonega Vortaro de Kabe, kiun devas posedi kaj konstante uzi ĉiu serioza Esperantisto.

4-e. La kvara parto enhavas rimarkojn koncernantajn la franca-angla kaj germanlingvanojn.

Estas ja superflue rekomendi, ke la libro estas havinda. — *Saljo*.


OOMOTO. — La nova spirita movado. Eldonita de Fremlanden-Propaganda Oficejo, Ajabe, Japanlando. 40 paĝoj. Prezo, 30 spesdekoj.

Presita sur bona papero kaj kun diversaj fotografajoj. La tekston ni legis kun plezuro kaj konstatis, ke la stilo iom deflankiĝas, tamen ĝi estas komprenebla kaj ne malbela. La nova religio ne konvinkis la recenzanton pro tio, ke li malfacile kredas je tiaj superhomaj benoj kaj fortoj. — *Saljo*.



Katedrala katedro

PALMA DE MALLORCA



Kastelo Bellver: Turoj

XII^a Kongreso de K. E. F.

21-25 Majo 1925 — Palma de Mallorca

Nia lasta numero publikigis la diversajn kondiĉojn de «Empresa Soler» specialajn por kongresanoj. La enskribiĝintoj, pagintaj la koston de la elektita klaso ĝis la 15 majo, ricevos antaŭ la ensipiĝo, la necesajn biletojn por la vojaĝo, hotelo, ekskurso, k. t. p. Tiu kiu ne volos atendi la lastan momenton por ricevi la biletojn, povos ilin ricevi ĉe Liceu Dalman, València, 245, Barcelono, du tagojn antaŭ la Kongreso.

La ordinarajn biletojn por vojaĝo al Palma oni povas aĉeti en Companyia Transmediterrània, Via Layetana, n.^o 2, unu tagon antaŭ la vojaĝo aŭ la saman tagon de la 10^a ĝis la 12^a matene, sed ni konsilas ke oni aĉetu ilin plej frue.

La prezoj de la ordinaraj biletoj por la vojaĝo inter Palma kaj Barcelona estas la jenaj (iro kaj reveno):

1. ^a klaso:	105'20 ptoj.	3. ^a klaso:	37'50 »
2. ^a » :	67'70 »	je ferdeko	21'50 »

Oni povas fari vojaĝon ĉiulunde, - marde, - ĵaŭde, - sabate.

Ni volonte aĉetos por kongresanoj biletojn laŭ mendo kaj antaŭsendo de la necesa sumo. Respondecon ni ne povas akcepti.

OFICIALA FORVETURO DE BARCELONA:

Ĵaŭdon 21 de majo je la 20'30.

La vaporŝipoj de Cia. Trans^a. staras dekstre de monumento Kolumbo, je 100 metroj proksimume.

OFICIALA FORVETURO DE PALMA:

Lundon 25 de majo je la 20'30.

Kongresaj sciigoj

Sendu vian aliĝon. — La O. K. presigis oficialan karton por la kongresanoj. Por ricevi ĝin estas nepre necese ke ĉiuj partoprenontoj sendu tuj sian aliĝon al la prezidanto de la O. K. Sro. Narciso Bofill, Sindikato 188, Palma de Mallorca, kiu estas senpaga por K. E. Fanoj, kaj kostas nur 5 ptojn. por aliaj samideanoj.

Oficiala Festeno. — Se vi deziras partopreni ĝin, sendu kiel eble plej baldaŭ vian enskribiĝon al la O. K. Estas ja kompreneble, ke por la bona organizo plej multe helpas tiu, kiu ne atendas la lastan momenton por agi.



Medalinsigno por la Kongresanoj de la XII^a Kongreso de nia Federacio

Kongreslibro kaj insigno

Al ĉiu kongresano oni donacos la kongreslibron kaj insignon, sed li nepre devas prezenti por ricevi ilin la ĝustatempe [petitan kongreskarton.


Membrokartoj. — Al la diversaj grupoj, kiuj pagis la kotizojn de la unua kvaronjaro, ni sendis la necesan nombron da kartoj disdonotaj al la grupanoj. Sur ĉiu karto oni skribu la nomon de la grupano. Rememoru ke laŭ la 9^a kondiĉo de nia regularo «Tots els esperantistes pertanyents a organismes federats, igual que els membres isolats, tindran veu i vot en les assemblees anyals, i llur vot serà delegable a un altre federat mitjançant el *membrokarto*, de presentació necessària per votar en nom propi i d'altres federats».

Grupoj, kiuj ne pagis ankoraŭ, sendu tuj la kotizojn por ricevi ĝustatempe la membrokartojn.

Membroj de K. E. F., pagu por ricevi la kvitancon de 1925.


BILANCO: De la 1 Julio 1924 ĝis la 1 Majo 1925.

ENSPEZOJ . .	Saldo, la 1 Julio 1924 . . .	374'15 ptoj.	
	Donacoj	530'40 »	
	Vendo de «K. E.», ŝlosiloj, vortaroj, k. a.	102'30 »	
	Kvitancoj (Kotizaĵoj kaj abonoj)	<u>1.626'40 »</u>	2.633'25 ptoj.
ELSPEZOJ . .	Diversaj elspezoj el la Vik' a Kongreso	108'50 ptoj.	
	Preso de K. E.	1.650'10 »	
	Aliaj presaĵoj	47'— »	
	Poŝtelspezoj	158'75 »	
	Ĝeneralaj elspezoj	<u>74'05 »</u>	<u>2.038'40 ptoj.</u>
SALDO: de la 1 Majo 1925.			594'85 »



Unu el la Palmaj hoteloj

PALMA DE MALLORCA



Katedrala fasada detalo

XI^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

Ni ricevis la du jenajn premiojn por temo laŭvola:

XLII. — Ekscelenca Deputataro de Baleares: 100 pesetoj.

XLIII. — Ekscelenca Urbestro de Palma: artobjekto.

Verdikto

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Originala versaĵo kantanta Amon: Premio al la verko n-ro. 108, devizo: **Els ulls són l'espill de l'ànima**. Al la aŭtoro de tiu ĉi verko oni aljuĝas la Naturan Floron kaj la rajton elekti la Reĝinon de la Festo.
- II. — Originala ama verko en prozo: Premio al la verko n-ro. 34, devizo: **Ni vidas, nenion ni scii povas**.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de la versaĵo: «La Pastoreta» Premio al la verko n-ro. 3, devizo: **Versa tradukado estas re-kreado**.
- II. — Traduko de la prozaĵo: «Via Blanquerna» Premio al la verko n-ro. 9, devizo: **Avis Rara**.

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de Sro. Narciso Bofill. — Duonigita inter la verkoj n-ro. 4, devizo: **Kaj Dio la eternulo...** kaj n-ro. 3, devizo: **Versa tradukado estas re-kreado**.
- II. — De S-ino. Maria Fornaris de Bofill. — Premio al la verko n-ro. 9, devizo: **Avis Rara**.
- III. — De F-ino. Amàlia Bofill Fornaris. — Premio al la verko n-ro. 33, devizo: **Migrado, jes, migrado**.
- IV. — De Sro. Antonio Rosselló. — Premio al la verko n-ro. 7, devizo: **Domine da mihi pacem!**
- V. — De Sro. José Salom. — Premio al la verko n-ro. 32, devizo: **Felicity**.
- VI. — De Sro. Pedro J. Tous. — Premio al la verko n-ro. 26, devizo: **Se ne la «se» malfeliĉa, mi estus homo tre riĉa**.
- VII. — De Sro. Miguel C. Oliver. — Ne konkursita.
- VIII. — De Sro. Mariano Jaquotot. — Premio al la verko n-ro 73, devizo: **Placi al ĉiuj neniu sukcesis**.

- IX. — De Sro Jaume M. Granada. — Premio al la verko n-ro 2, devizo: **En versfarado, formo estas funda.**
- X. — De Banko Fomento Agrícola de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 106, devizo: **Konstantinopolo.**
- XI. — De Banko Crédito Balear. — Premio al la verko n-ro 38, devizo: **Majfloro.**
- XII. — De Fomento del Civismo. — Premio al la verko n-ro 59, devizo: **Vi estas prava, etulo.**
- XIII. — De Caja de Ahorros y Monte de Piedad de las Baleares. — Premio al la verko n-ro 43, devizo: **Natura.**
- XIV. — De Asociación per la Cultura de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 27, devizo: **Plumo ne sentas, papero silentas.**
- XV. — De Banko Vitalicio de España. — Premio al la verko n-ro 44, devizo: **Noktmeza batalo.**
- XVI. — De Fervoja de Sóller. — Premio al la verko n-ro 109, devizo: **No hi fa res que m'enganyis.**
- XVII. — De Ruĝa Kruco (Santa Catalina). — Premio al la verko n-ro 39, deviza: **Maltrankvilo.**
- XVIII. — De Prezidanto de K. E. F. — Premio al la verko n-ro 93, devizo: **Sóc al país dels tarongers florits.**
- XIX. — De Sekretario de K. E. F. — Premio al la verko n-ro 16, devizo: **Pax Vobis.**
- XX. — De Episkopa Moŝto de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 37, devizo: **Pli da aferoj troviĝas en ĉielo kaj sur tero ol filozofio klarigas.**
- XXI. — De Oficiala Ĉambro de Urbobieno. — Premio al la verko n-ro 110, devizo: **Patrino kaj infano.**
- XXII. — De Ĝenerala Societo de Elektraj Tramvetuiloj. — Premio al la verko n-ro 70, devizo: **La bonuloj el ĉiu nacio havas lokon en Paradizo.**
- XXIII. — De Esperantista Klubo Palma. — Premio al la verko n-ro 101 devizo: **Ad pedem litteram.**
- XXIV. — De Oficiala Ĉambro de Komerco, Industrio kaj Navigado de Palma. — Premio al la verko n-ro 60, devizo: **Laboro de l' mano, de l' koro la sano.**
- XXV. — De Fomento de Turismo de Palma. — Premio al la verko n-ro 5, devizo: **Lingvo sen poezio estas korpo sen spirito: mortintaĵo.**
- XXVI. — De Asocio de la Baleara Gazetaro. — Premio al la verko n-ro 47, devizo: **Komuna sorto.**
- XXVII. — De S-ro Fernando Ramirez. — Premio al la verko numero 87, devizo: **Turbano kaj duoniuno.**
- XXVIII. — De S-ro Miguel Guasp. — Premio al la verko n-ro 83, devizo, **Parolantaj ŝtonoj.**

- XXIX. — De S-ro Antonio Coll. — Premio al la verko n-ro 105, devizo: **La Fianĉino de la Morto.**
- XXX. — De Esp. Grupo Ĝerona Espero, Girona. — Ne konkursita. La premianto konsentas aljuĝi la duonon de la premio al la verko n-ro 111, devizo: **Amo plej supera rajto.**
- XXXI. — De S-roj Ĉefoficistoj kaj Oficistoj de Poŝto, Palma. — Premio al la verko n-ro 95, devizo: **Vindicamus hereditatem patrum nostrorum.**
- XXXII. — De S-ro Rafael Blanes. — Premio al la verko n-ro 41, devizo: **Fjodor.**
- XXXIII. — De Moŝta Kolegio de Prokuristoj, Palma. — Premio al la verko n-ro 67, devizo: **Fortuno favoras kuraĝulon.**
- XXXIV. — De Veloz Sport Balear. — Premio al la verko n-ro 98, devizo: **Amo diverse komprenita.**
- XXXV. — De Mallorka Societo Protektanta de Bestoj kaj Plantoj. — Premio al la verko n-ro 71, devizo: **La vivo estas ŝonĝo kaj la Amo la suno de eterna maja tago.**
- XXXVI. — De S-ro Bartolomé Font. — Ne konkursita.
- XXXVII. — De La Hejmo de l' Estonteco. — Premio al la verko n-ro 25 devizo: **Pacienco, energio kaj laboro ĉion venkos.**
- XXXVIII. — De Moŝta Kolegio de Advokatoj. — Premio al la verko n-ro 31 devizo: **Tapuaĥ.**
- XXXIX. — De Oficiala Kolegio de Farmaciistoj. — Premio al la verko n-ro 15, devizo: **Omne Trinum est perfectum.**
- XL. — De Oficiala Kolegio de Kuracistoj. — Premio al la verko n-ro 56, devizo: **Sankta vesper', paca vesper'.**
- XLI. — De Federación Patronal de Mallorca. — Premio al la verko n-ro 12, devizo: **Don Dinero.**
- XLII. — De Ekscelenca Deputataro de Balears. — Premio al la verko n-ro 50, devizo: **ĉela graco — kora paco.**
- XLIII. — De Ekscelenca Urbestro de Palma. — Premio al la verko n-ro 107, devizo: **Asonancoj**

La 111 verkoj ricevitaj formas 21 grupojn. En diversaj grupoj, kelkaj verkoj ricevas premion kaj aliaj meritas mencion. Jen la listo de la grupoj kun la premiitaj kaj menciitaj verkoj. La devizon de la premiitaj verkoj vidu pli supre:

- I. — 1-a premio al la verko n-ro 108; — 2-a P. al n-ro 4; — 3-a P. al n-ro 107. 1-a Mencion al la verko n-ro 51, devizo: **Se socio pek-
kas, amo krimas**; 2-a. Mencion al la verko n-ro 36, devizo: **Laŭ
la maniero de Rubén Darío**; 3-a Mencion al la verko n-ro 45,
devizo: **Ami... ami... ami!**
- II. — Premio al la verko n-ro 34. 1-a Mencion al n-ro 35, devizo: **Poly-
hymnia**; 2-a Mencion al n-ro 23, devizo: **Amo venkos malpacon.**
- III. — Premio al la verko n-ro 3.

- IV. — Premio al la verko n-ro 9. Mencio al la verko n-ro 17, devizo: **Marrigardejo.**
- V. — Premio al la verko n-ro 93. Mencio al la verko n-ro 28, devizo: **Vora el barranc...**
- VI. — Premio al la verko n-ro 16. Mencio al la verko n-ro 89, devizo: **Canigó.**
- VII. — 1-a Premio al la verko n-ro 106; dua al n-ro 33; tria al n-ro 32; kvara al n-ro 73. 1-a Mencio al la verko n-ro 91, devizo: **Silento estas oro**; dua al n-ro 6, devizo: **Finis coronat opus**; tria al n-ro 97, devizo: **Valoraj pensoj.**
- VIII. — 1-a Premio al la verko n-ro 38; dua al n-ro 2. 1-a Mencio al la verko n-ro 72, devizo: **Vian ĉielon kovru, Zeus**; dua al n-ro 76, devizo: **Ex abundantia cordis**; tria al n-ro 86, devizo: **Tro-severeco estas fiereco.**
- IX. — 1-a Premio al la verko n-ro 59; dua al n-ro 27. 1-a Mencio al la verko n-ro 69, devizo: **Kulpoj de patro persekutas idon**; dua al n-ro 58, devizo: **Arbara silento.**
- X. — 1-a Premio al la verko n-ro 7; dua al n-ro 44; tria al n-ro 109. Mencio al la verko n-ro 13, devizo: **Kial plendi se estas amo?**
- XI. — Premio al la verko n-ro 39. Mencio al la verko n-ro 75, devizo: **Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj.**
- XII. — Premio al la verko n-ro 26. Mencio al la verko n-ro 54, devizo: **Fata Morgana.**
- XIII. — 1-a Premio al la verko n-ro 37; dua al n-ro 70. 1-a Mencio al la verko n-ro 53, devizo: **Malofta temo**; dua al n-ro 66, devizo: **Ŝajni - kaj esti, jen diferenco**; tria al n-ro 18, devizo: **Libri oracua pandunt.**
- XIV. — Premio al la verko n-ro 47. Mencio al la verko n-ro 46, devizo: **La patrujo super ĉio.**
- XV. — 1-a Premio al la verko n-ro 87; dua al n-ro 83. Mencio al la verko n-ro 52, devizo: **Rememoroj.**
- XVI. — 1-a Premio al la verko n-ro 110; dua al n-ro 105; tria al n-ro 41; kvara al n-ro 67. Mencio al la verko n-ro 68, devizo: **Kio komenciĝas, devas nepre finiĝi.**
- XVII. — 1-a premio al la verko n-ro 101; dua al n-ro 98; tria al n-ro 71; kvara al n-ro 111. Mencio al la verko n-ro 92, devizo: **Amor omnia vincit.**
- XVIII. — 1-a Premio al la verko n-ro 60; dua al n-ro 25. 1-a Mencio al la verko n-ro 61, devizo: **Beninda malsato**; dua al n-ro 65, devizo: **Lori**; tria al n-ro 57, devizo: **Supren la kapon!**
- XIX. — 1-a Premio al la verko n-ro 95; dua al n-ro 31, tria al n-ro 5. Mencio al la verko n-ro 94, devizo: **De quan les bèsties parlaven.**
- XX. — 1-a Premio al la verko n-ro 50; dua al n-ro 15; tria al n-ro 56; kvara al n-ro 12. 1-a Mencio al la verko n-ro 14, devizo: **La Poesia non muore**; dua al n-ro 48, devizo: **Larmiĝinta ĝojo**; tria al n-ro 19, devizo: **Suno leviĝas — La mondo viviĝas.**
- XXI. — Premio al la verko n-ro 43.

Laŭ la dua regulo de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj fariĝas propraĵo de la Konservantaro, kiu zorgos pri ilia publikigo.

Permeson por reprodukto oni petu de la Redakcio de *Kataluna Esperantisto*.

Majo de 1925. — Kolomano de KALOCSAY, *Prezidanto*; J. SCHMID; Eŭsebo ARTIĜAS; Narciso BOFILL; Frederic PUJULÀ i VALLÈS; S. ALBERICH JOFRE, *Sekretario*

Tra la Gazetaro

«*Pola Esperantisto*». — n-ro. 3 (marto). — El la marta numero ni ĉerpas la jenan alvokon:» Kion pensas pri tio ĉiulandaj esperantistoj? — En Nro. 294 (p. 32) de la ĝeneva «*Esperanto*» aperis sciigo, ke *la Centra Oficejo de U. E. A. okazigis voĉdonon pri uzo de landnomoj*. Tute sendepende de niaj opinioj pri la landnoma demando, konataj al niaj legantoj, la fakto mem ŝajnas al ni *io absolute eksterordinara*. Kio okazos kun Esperanto, se krom la Lingva Komitato voĉdonos pri lingvaj demandoj diversaj aliaj organizoj? Facile antaŭvidi. Baldaŭ ni legos en niaj kronikoj. — «ETURBET (10.000 loĝantoj). La Centra Oficejo de Eturbeta Esperanto Asocio, fondita hieraŭ (enskribiĝis tuj pli ol 150 anoj!), esploris zorgeme la landnoman demandon. Dezirante kunigi diversajn opiniojn, ĝi per 11 voĉoj (kontraŭ 1 sindeteno) decidis akcepti la sufikson *ej* por ĉiuj landnomoj (ekz.: *Svisejo, Ĉeĥoslovakejo*). La Centra Oficejo instrukiis la Asociojn daŭre sekvi tiun principon senescepte». Esperantistoj! Ĉu vere aŭdiĝos inter vi neniaj voĉoj de protesto, de persvado? Ĝis nun *ni solaj faris tion*. Se Esperanto devas resti *unu* lingvo, venis tempo, ke helpu nin aliaj! La voĉdono de la Centra Oficejo de U. E. A. nepre estas nuligota! «Niaj polaj samideanoj ne estas solaj. Nia lasta numero publikigis artikolon de Sro Jaume Grau Casas per kiu oni faris saĝajn avertojn al la gvidantoj de U. E. A. Ni plene subskribas la plendon de nia kunfrato *Pola Esperantisto* kaj esperas, ke por la bono de nia afero U. E. A. forlasos la entreprenitan danĝeran vojon, kiu povus konduki nin al pereiga disiĝo de niaj fortoj.

«*Espero Katolika*». — n-ro. 8 (aprilo). — Tre interesa gazeto kun artikoloj tre gravaj pri katolikaj aferoj. Ĝia enhavo estas redaktata en fundamenta kaj imitinda Esperanto, tre malofte trovebla en aliaj bruantaj gazetoj. La X-a. Katolika Esperanto-Kongreso okazos en Paris la 13-16 aŭgusto 1925. La kongresa kotizo estas 25 fr. frk. Ĝi donas la rajton ĉeesti ĉiujn kunsidojn, religiajn ceremoniojn kaj la amuzan vesperon, kaj ricevi ĉiujn kongresajn dokumentojn kaj insignon. — Por detaloj kaj aliĝo oni turnu sin al Fino. M. Larroche, rue de Vaugirard, Paris VI.

«*La Progreso*». — n-roj. 4-5 (febr. marto). — Interesa gazeto kun regule aperantaj artikoloj pri la ĉeĥoslovaka popolo, kiun ĝenerale bone konas katalunoj. La aludita numero publikigas interesplenan artikolon pri Masaryk kaj Beneš, fondintoj de Ĉeĥoslovaka Respubliko, kaj krom aliaj valoraj artikoloj kun celo nacia en ĝi aperas kun bela enhavo la rubrikoj «Literaturo», «Por comencantoj», «El scienco», «Lingva fako» k. t. p.

«*Belga Esperantisto*». — n-ro. 1 (jan). -- Ĝi reaperas vigla kaj ĉarma post longa krizo. La presisto estas kulpa, ke ĝi ne aperadis akurate, la presisto kaj la oscedantaj proletariaj poŝoj, kiuj ĉie bataladas kontraŭ la esperantistoj Ni deziras al nia kunbatalanto, kiu estas presata sur bona papero kaj belstile, longan vivon kaj ne malpli longan pacon kun la presisto. XIV-a. Belga Kongreso okazos en Verviers. 31 majo-1 junio.

«*Germana Esperantisto*». — n-ro. 4 (apr). — Sub la plumo de Sro. Fr. Ellersiek, la konata sprita kaj sagaca germana samideano, G. E. akiris enviindan reliefon ĉe la esperantista gazetaro. Ne nur por germanlingvanoj ĝi estas vera juvelo; ĉiuj esperantistoj trovos en la abunda esperanta teksto artikolojn, kiuj fariĝas aparte interesaj pro la stilo kaj merito de ĝiaj verkintoj. Magdeburg estos dum Pentekosto la scenejo de la XIV-a. Germana Esperanto-Kongreso. Al ĝi ni deziras grandan sukceson!

«*Le Monde Espérantiste*» — n-ro. 1 (jan. febr). — La batalema malnova gazeto energie batalas kontraŭ la deflankiĝoj de U. E. A. kaj daŭre subtenas lingvan disciplinon. Tiu ĉi gazeto iafaje, eble, pro aferoj pure personaj tro multe bruis, sed oni ne povas nei, ke ĝi estas la sola gazeto en Esperantujo, kiu plej sincere ĉiam sin tenis, ne fordonante sin al fantazio kaj troigita entuziasmo fiktiva.

«*Literatura Mondo*». — n-ro. 4 (apr). — Kiel kutime ĝia enhavo superas la dezirojn de plej postulema literaturamanto. Verkoj de alta merito kaj de rafinita stilo donas al ĝi rajton por okupi la unuan lokon en ĉiu biblioteko kaj rajton donas al ĝi ankaŭ por esperi, se ne postuli, pli efikan subtenon de la tutmonda esperantistaro. Katalunaj amikoj, turnu vin por tuja abono al la reprezentanto en Barcelono. (Vidu anoncon).

Fajreroj

Saluto de K. E. F. al Kordova Kongreso. — Nia eminenta poeto S-ro Artur Domènech havos la ŝancon ĉeesti la proksiman Kongreson de la Iberia Konfederacio, kaj nia Kataluna Esp. Federacio havos la honoron saluti persone de nia amiko tiun Kongreson.

Gazetoj ricevitaj. — Litova Stelo, marto. — La Taquigrafia, aprilo. — La Progreso, febr. marto. — La Semisto, aprilo. — Sudameriko, marto. — Marto, aprilo. — Heroldo de Esperanto, 1, 4, 8, 11 aprilo. — La Ora Epoko, marto. — Reklamo, marto. — Espero Teozofia, januaro-marto. — Katolika Mondo, marto. — International Language, marto. — The British Esperantist, marto. — La Interligilo, febr. marto. — Pola Esperantisto, marto. — Esperantista Junularo, aprilo. — Amerika Esperantisto, jan. febr. — Arguso, febr. — Hungara Esperantisto, aprilo. — Itala Esperanta Revuo, marto. — La Suno Hispana, aprilo. — Belga Esperantisto, jan. — Arbeider Esperantisten, marto. — La Espero, aprilo. — Revista del Ateneo, aprilo. — Holanda Esperantisto, aprilo. — Espero Katolika, aprilo. — Le Monde Espérantiste, jan. febr. — La Fervoĵisto, febr. marto. — Konkordo, marto. — Germana Esperantisto, aprilo.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), ŝ, ŭ, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima sil·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els,
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix a formar

el femeni
heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komerci
(comerciar)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

IS

temps passat

OS

temps futur

US

mode condicional

U

mode imperatiu o subjunctiu

Mi skribas
Jo esric

skribis
escrivi

skribos
escriuré

skribus
escriuria

skribu
escrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo esric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.

LITERATURA MONDO

La plej valora literatura esperanta revuo.

Rekomendita de la XVIa Universala Kongreso de Esperanto.


Ĉiu esperantisto devas ĝin aboni.

La plej bonaj stilistoj estas ĝiaj kunlaborantoj.

Turnu vin por abono:

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a
BARCELONA



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al
HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Duonsemajna
Aktuala Ilustrita
Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT
STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a
BARCELONA

1 0 0 0 0

membrojn
devas
havi

U E A

en 1925.

Aliĝu tuj por atingi

1 0 0 0 0

Aliĝojn akceptas la lokaj Delegitoj, aŭ la Delegito en Barcelona: S-ro Delfi Dalmau, València, 245

H A V E B L A

1/4 - paĝa anonco en nia gazeto
kostas nur 10 ptojn ; sed valoras
multe.